

Bô Yin Râ

**LA SENCO
DE LA VIVO**

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

El la Germana originalo
(„Der Sinn des Daseins“, 1927)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

© 1927
êe Kober Verlag Bern, Svislando

ALVOKO

Vi *laciĝis* pro longa serĉado, kaj nun vi estas laca de *la serĉado mem*. –

Vi ekde nun volas *rezigni* ĉian serĉadon, ĉar nenie estis *trovebla* tio, kion vi serĉis. –

La *landon de la vivantoj* vi iam volis trovi, kaj la *templon de eterneco*.

Sed kien ajn vi direktis viajn paŝojn, tie estis reĝo: *la morto*, kaj ĉiu templo kaŝis en sia plej interna, sekreta ujo nur senpotencan *idolbil-*
don...

Vere, mia amiko, vi *devis* laciĝi dum tia serĉado, same kiel laciĝis tiom multaj *aliaj*, iam ekirintaj kun firma espero kiel vi.

Nenia riproĉo estu farata al vi, kaj neniu malmola parolo devas timigi vian oreilon, ĉar *ne* estis via *kulpo*, ke vi dum la migrado en malproksimaj regionoj *ne trovis*, kion vi serĉis kun tiom arda sopiro. –

Oni montris al vi vojojn, kiujn oni mem neniam estis irinta.

Oni promesis al vi ion, kion oni mem neniam estis trovinta.

Oni irigis vin sur padoj, kiujn oni mem antaŭ longe devis forlasi.

Kiel vi estus povinta trovi *plenumiĝon* tie, kie aliaj spertis nur *elreviĝon* post *elreviĝo*, ĝis ili laciĝinte direktis siajn paŝojn *returne*, se ili mem iam estis ekirintaj la vojojn, kiujn oni montris ankaŭ al vi? –

Kiel vi iam estus povinta *atingi* sur *tiuj* vojoj la *celon* de via sopirado? –

Sed *ne* koleru kontraŭ tiuj, kiuj montris al vi la malĝustajn vojojn, ĉar ili mem ne havis pli bonan scion, *ne konante* la ĝustan vojon.

Kiam ili diris al vi: „*Tien*, serĉanto, vi devas turni vin!“ – aŭ: „*Tie*, strebanto, estas la ĝusta vojo por vi!“ – la plej multaj el ili opiniis, ke ili donis al vi *bonan* konsilon...

Eĉ se ili montris al vi vojon, kiun ili mem estis *forlasintaj elrevigite*, ili tamen ankoraŭ

kredis, ke eble vi povus sukcesi en tio, en kio ilia propra forto antaŭe malsukcesis...

Sed se trompis vin *potencavida fantaziulo*, aŭ eĉ *kanajlo bone scianta*, ke li montris al vi vojon *eraran*, tiam danku al la ĉielo, se vi eskapis el tiu servuteco, sed ankaŭ en tia okazo ne arogu al vi la oficon de *juĝisto*, ĉar tiu, pri kiu vi eble volas eldiri la verdikton, jam estas juĝita *per sia propra farado*. –

Ankaŭ ne *plendu* kontraŭ via sorto pro tio, ke ĝis nun ĝi ne lasis vin *trovi*, kaj *ne insultu vin mem* tial, ke, estante laca kaj seniluziigita, vi vidas vin en la sama loko, de kiu vi iam ekiris kun ĝoja espero. –

Kion utilis al vi plendo kaj malbeno? –

Se tiuj ĉi vortoj atingas vin, tiam vi vere ne plu havas ian kaŭzon por malbeni vian ĝisnunan eraradon.

Jen via vojo estos benata ekde tiu ĉi tago, kaj oni *ne plu* vidos vin sur *eraraj vojoj*.

Tie ĉi nun parolas al vi homo, kiu vere *scias* pri la *vojo al la realo*.

Tie ĉi parolas al vi homo, kiu vere *povas* kaj *volas* montri al vi tiun vojon, por ke vi finfine *atingu* la celon de via sopiro! –

Sekvu min, kaj ĉe ĉiu paŝo vi sentos kreski en vi la forton por persisti ĝis la celo!

Ne *mi* serĉis vin, kaj ne *al mi* vi ŝuldas, ke vi trovis min.

Via propria serĉado, kiu tiom longe iris sur malĝustaj vojoj, finfine fariĝis *libera*, post kiam vi forsendis ĝin, *laciĝinte* je ĝi...

Nun *libera*, ĝi hodiaŭ igas vin finfine malkovri tion, kio antaŭe estis kaŝita al vi...

Estas nur *via volo de serĉanto*, kiu *devis* trovi min. – –

Ne estis vane, ke vi antaŭe serĉis sur *erarigaj* vojoj. –

Ne estis vane, ke vi sekvis instruojn, kiuj ne *povis* konduki vin al la celo. –

Kie ajn vi serĉis, ĉiam via serĉado *pligrandigis* vian *forton* de serĉado, same kiel elektra forto pligrandiĝas pasante tra bobeno, – kaj hodiaŭ, kiam vi opiniis, ke via tuta serĉado estas

nur malbeninda, finfine doniĝas al vi tio, kion vi ne plu kuraĝis esperi. — — —

Kie ni ĉiuj, surtere vivantaj, profunde baziĝas – *konscie kaj ne konscie* – en la sama *spirita vivo*, tie oni *ekvidis* vian mizeron kaj *sciis*, kiel forigi ĝin...

Mi nun estas sendita al vi, kaj vi trovis min, *ĉar mi vere povas helpi vin kaj ĉar neniu alia dum viaj surteraj tagoj povus alporti al vi la saman helpon...*

Vere ne dependas de *mi*, ke la afero estas tia, sed mi ankaŭ ne povas ŝanĝi, kion mi mem ne ordigis, kaj *vane* vi provus ĝeni la ordon tie ĉi ekzistantan: – *vane* vi explore rigardus por trovi *alian* helpon...

Vi min vokis sen koni min. —

Mia parolo atingas vin sen tio, ke mi scias pri vi. —

Vi ankoraŭ ne povas scii, kiu parolas al vi per tiuj ĉi vortoj, kaj mi vere ne kritikas vin, se vi, post multaj elreviĝoj kaj amare kruelaj spertoj, ankoraŭ timeme hezitas sekvi mian voĉon.—

Vi egalas erarvaganton, kiu en malluma nokto aŭdas ie la vokon de vojospertulo kaj unue

malfidas lin, estante plena de timo kaj suspekto, ĉar samregione iam okazis rabo kaj murdo...

Certe *ankaŭ mi hezitus*, se mi starus en via loko!

Sed jen mi atendas de vi nenion alian ol ke vi, ĉiam estante atenta pri via vojo, sekvas la lumilon, kiun mi ekflamigas antaŭ vi.

Gvidante mi portas ĝin, tiel ke vi *mem* facile povas vidi, *kien* mi vin kondukas. –

De kie mi mem ekhavis la konon pri la ĝusta vojo, kaj kial hodiaŭ nur mi sola povas montri ĝin, neniel bezonas okupi viajn pensojn en la nuna momento.

Estu nuntempe kontenta, ke vi tuj *ekkonos*, kiel mi preparas al vi la vojon el la konfuzajo.

Kiom ajn ofte oni *trompis* vin: *tiuĉifoje* vi *vere ne* estos trompita.

Jam post la unuaj paŝoj vi malkovros, ke sur *mia* vojo *neniu* trompo *iam* povas renkonti vin.

Ĝis hodiaŭ vi povis opinii vin *rajtigita* mokridi ĉiun, kiu diris al vi, ke povas ekzisti homo,

kiu *scias* pri la vojo al la vero kaj estas *preta*
konduki vin sur tiu vojo...

Sed hodiaŭ vi renkontis tiun homon.

Decidu *vi mem*, ĉu vi volas *sekvi* min!

Decidu *mem*, – ĉar dependas *nur de vi mem*,
– ĉu al vi ankoraŭ valoras la penon, por finfine
atingi *la longe alstrebatan altan celon de via*
sopiro!

LA PEKO DE LA PRAPATROJ

Vere: – por vi mem vi estas *enigmo*, kiun vi ankoraŭ ne povas *solvi*.

Kvankam oni instruis vin ekde via frua juneco, rakontante al vi, kiel *aliaj* solvis la enigmon, kiun ili trovis en *si mem*, tamen venis por vi tago, en kiu *ĉiu* respondo de *aliuloj* vekis nur novan *demandon* en vi mem...

Vi volis atingi *pacon en vi mem* kaj ekkonis pli kaj pli klare, ke tre malmulte utilis al *vi* tio, kio antaŭe kontentigis *aliajn*...

Sed nun vi – laca kaj rezignacianta – *ĉesis* serĉi la *solvon* de via *vivoenigmo*...

Nun vi venis al la laŭsupoza ekkono, ke sur tiu ĉi tero viaj demandoj *neniam* povas ricevi respondon, – respondon, kiu kondukus al *pa-co*...

Kaj tamen, mia amiko, tia respondo vere doniĝos al vi.

Mi volonte montros al vi, *kiel* vi mem povas *solvi* la enigmon, kiu vi estas por vi mem.

Sed por atingi tiun eblon, vi unue devos lerni kompreni, ke *ĝusta respondo* povas sekvi nur *ĝuste formulitan demandon*, – tiel ke la multaj homoj, kiujn vi aŭdas plendi, ke ili neniam ricevis la esperitan *respondon*, devus prefere plendi, ke ili neniam trovis la *ĝuste formulitan demandon*. – –

Vi estas amarigita, ĉar ankaŭ vi ankoraŭ ne ricevis la longe sopiratan respondon, – sed neniam venis al vi la ideo esplori, ĉu vi scias *ĝuste demandi*.

Kvankam vi ĉiam denove devis amare sperti, ke ĉiu respondo de aliuloj *ne* povis doni *pacon al vi*, – vi tamen trankvile kaj senkritike transprenis de tiuj aliuloj *la malĝuste formulitajn demandojn...*

Kiel vi povis esperi, *uzante tian demandon*, iam ricevi *vian* respondon?...

Kiel vi povis implikiĝi en la iluzio, ke *la maniero demandi* de tiuj aliuloj devas vekti en vi

respondon *diferencan* de tiu, kiun ili mem ricevis, sed kiu *ne* kontentigis vin?

Vidu: – *la peko de viaj prapatroj*, mia amiko, hodiaŭ *suferigas* vin, kaj nur vi povas fariĝi la *savanto* de viaj patroj, – nur vi povas nun *forigi* ilian pekon. – –

Kio iam sufiĉis al viaj prapatroj por *mem* esti kontentaj, ĝuste *tio* hodiaŭ *rabas* al vi *vian* pacon.

Ankaŭ viaj prapatroj iam estis fariĝintaj por si *enigmo*, kaj sekve ili serĉis al si *sian* solvon: – solvon, pri kiu ili intencis, ke ĝi *ligu* vin...

Kion ili estis *trovintaj por si*, tio fariĝis *via heredaĵo*, kaj igis vin fari novan *demandon*.

Sed samtempe ili heredigis al vi *manieron demandi*, kiu *neniam* povas alporti al vi *tiun* respondon, en kiu dissolviĝas ĉiu el viaj demandoj, kiel matenaj nebuloj malaperas en la lumo de la suno...

Se vi ne volas eterne resti *enigmo* por vi, vi devos *rezigni* heredaĵon, kiu povas fariĝi por vi nur *fatalaĵo*. –

Vi mem nun devos krei al vi *novan* manieron demandi, kaj la *respondo* de viaj patroj ne plu igu vin formuli demandojn laŭ *ilia* maniero demandi!

Vi trovos *vian* internan *pacon* nur post kiam vi lernis demandi en *via* maniero. — —

Do ekde nun demandu *ne* plu pri la „*Dio de la patroj*“, sed *pri via Dio vivanta en vi!*

Demandu *ne* plu pri la „*valoro de la vivo*“, sed *pri la valoro, kiun vi povas doni al via vivo!*

Ne plu demandu pri la „*senco de la homa ekzistado*“, sed demandu vin, *kiel via ekzistado povas ricevi sencon per vi mem?!*

Ne plu demandu: — „*Kio estas la homo?*“ — — sed ekde nun demandu vin, *ĉu vi mem estas tio, kio vi povas esti?!*

Ne plu demandu: — „*Ĉu ekzistas animo?*“ — — sed demandu vin, *kio je vi estas „animo“, kaj kiel vi povus konsciigi pri ĝi?!*

Ne plu demandu: — „*Ĉu ekzistas vivo post la morto?*“ — — sed demandu vin, *kion vi povas fa-*

ri dum via surtera vivo, por akiri al vi konscian pluviadon en la eterneco?!

Ne plu demandu: – „*Kio estas la vero?*“ – – sed demandu, *ĉu vi mem estas verama kaj volas toleri en vi nenion, kio povus malklarigi vian veron?!*

Se vi formulas viajn demandojn *tiamaniere*, tiam certe *ĉiu* el ili ricevos respondon, kiu alportos al vi la arde sopiratan internan pacon. –

Oni jam demandis pri multo, kiun oni vere *ne bezonas scii...*

Tiel do oni mem serĉis al si respondon, kiu nur *ŝajne* estis „respondo“, kaj *ĉiu* tia laŭsupoza respondo *devis* vekti novan *demandon*, eĉ se *ĝi* vekigis nur *en posteuloj...*

Se vi volas plue demandi samamaniere, vi vidos ne nur *vin mem* ĉiam antaŭ *novaj* demandoj, sed ankaŭ postlasos al *venontaj* generacioj *demandojn* *ĝuste* en tio, kio *ŝajnis* al vi respondoj. –

Tial zorgu, ke *ĉiu* demando, kiu eble premas vin, trovi en vi la *ĝuste formulitan formon*, kiu

devas rezultigi vian respondon vin kontentigantan.

Neniu alia homo iam povas doni al vi vian respondon. –

Ĝi estas atingebla en vi nur kiel sperto, kaj vi povas sperti ĝin nur en vi mem. – – –

Ĉio, kion oni ĝenerale kutimas nomi „respondoj“ al finaj demandoj, – eĉ se temas pri vorto de homo, kiun la posteularo adoras kiel „dion“, – ĉiam vekas novan demandon de generacio al generacio.

Tia „respondo“ povas plejfavoraokaze nur motivigi vin trovi en vi mem la ĝustan formon de demando, kiu vere alportas respondon en interna spertado.

Sed la prapatroj kredis – kaj ili tion kredis tre ofte ekde antikva tempo –, ke ekstera respondo, kiu kontentigis ilin mem, estas definitiva, nerefutebla respondo, tiel ke nur malsaĝuloj aŭ sakrilegiantoj povas demandi pri alia respondo...

Eble ili honeste kredis, ke ili tiel postlasas al venontaj generacioj *heradaĵon benoplenan...*

Sed vi, mia amiko, devis sufiĉe sperti je vi mem, kia granda *malbeno* pezas sur tiu heredaĵo. --

Nun estas *via* tasko, *meti finon al tiu malbeno*.

Sed vi povos neniigi ĝin *nur*, se vi *ne transdonas senekzamene* la solvon, kiun elpensis al si viaj patroj por solvi la enigmon de sia ekzisto, kaj se vi ne postulas de homoj atente aŭskultantaj *vin*, ke ili agnosku la respondon, kiun *vi mem* ricevis, kiel *sian* respondon! --

Kiam vi trovas en vi la respondon, kiu alportas la *pacon* al *vi mem*, tiam utiligu ĝin nur por helpi aliulojn *siaflanke* *demandi* ĝustamaniere en si mem!

Vi mem ĉiam formulu en ĝusta maniero vian demandon, al kiu devas veni al vi respondo, kiu vere *estas por vi mem neŝancelebla*, -- sed ne kredu, ke *via* respondo devas esti *transprenata* de aliuloj, por ke ĝi estu *ilia* propra respondo!

Ĉiu, kiu hodiaŭ vivas kun vi sur la tero, kaj *ĉiu*, kiu venos *post* vi, devos lerni *por si mem* la

ĝustan formuladon de demandoj, kaj nur *en sia propra spertado* ĉiu ricevos *sian* respondon al la finaj demandoj pri sia ekzisto. — —

Sed kiu *solv*is la enigmon, kiu li antaŭe estis *por si mem*, tiu nur avertu la aliajn kontraŭ la eraro, ke tera homo povas solvi la vivoenigmon de *aliulo!*

Li atentigu pri tio nur *tie*, kie li vidas la danĝeron, ke serĉantoj lasas sin *erarigi* per la heredaĵo de la patroj! — — —

LA PLEJ ALTA POSEDO

Prave estos nun parolate tie ĉi nur pri *via* „plej alta posedo“, ĉar nur tio, kio estas *via posedajo*, – kio apartenas *sole nur al vi* kaj kion neniu alia, kiu ajn li estas, povus iam *forpreni* de vi, – vere estas *plej alta posedo* por vi.

Vi mem estas tiu plej alta posedo en la *plej interna interno* de la animo, – plejinterno, kiun aliulo neniam povas tuŝi, kaj kiu malkaŝas sin eĉ *al vi* nur en *spertado*, ĉar *via* pensado neniam *ekkaptos* ĝin.

Vi sentas *vin mem* kiel „*mi-on*“, sed eble vi ankoraŭ ne suspektas, ke *ĉio*, *kion* vi ĝis nun sentas en vi kiel „*mi-on*“, lumas en vi nur kva-zaŭ malforta *rebrilo*, – elsendita el *via vera esto*, sed kovrita kaj tre malheligita per la nubonebulo, kiun eĉ *via* plej klara pensado postlasas...

Nur en maloftaj kaj solenaj momentoj tiu *vera esto* penetras tra ĉio malklara en vi mem, por atingi vian *cerbokonscion*, kiu tiam timigite

perceptas ĝin kaj sentas ĝin kiel *plej fremdan* aferon.

Tamen *nur* tiu vera *esto*, kiun vi en tiaj momentoj subite sentas kaj tiam interpretas *kiel fremdan, altan potencon*, estas reale *via propria posedaĵo*. — — —

Kion ajn alian vi *kredas* posedi en vi, povas ĉiutempe esti *prenata for* de vi, — apartenas al vi nur dum la mallonga tempo de via surtera vivo.—

Nur tiu vera *esto, generata de la spirito en la spirito* ekde eterne, restas *via posedaĵo* de eterne ĝis eterne, tuj kiam via konscio enprenis ĝin en sin. — —

Estos al vi senteble el tiuj vortoj, ke *nur tio ĉi unu* povas esti rigardata kiel „*plej alta*“ posedo, — eĉ se via tera intelekto *elpensas* al si iun aŭ alian aferon, kiun ĝi eble deziras rigardi kiel plej altan posedon.

Sed vi ankoraŭ ne scias *utiligi* vian plej altan posedon.

Vi egalas al riĉulo de tiu ĉi tero, kiun oni, pro kruela malsaĝa kaprico, edukigis en plena *mize-ro*, por ke li ne *sciu* pri sia posedaĵo, kaj kiu nun sensuspekte *petadas* sian panon kiel almozon tie, kie li mem estas *mastro de la grundo*...

Via ekzisto restas vere „*sensenca*“, se vi ne mem donas al ĝi jenan „*sencon*“: – ke ĝi faru vian plej altan posedon *ekkonebla* al vi *per la kontrasto* kun la ŝajna posedaĵo en la ŝajna mondo!

Sed vi devas ankaŭ *voli* lerni ekkoni, kion via ekzisto havas por malkaŝi al vi.

Vi ne devas tiom ligi vin al via *ŝajna posedaĵo*, ke vi perdas ĉiom de la sopiro, kiu ankoraŭ povus vekti en vi la fortojn bezonatajn de vi, se vi volas malaperigi la nubonebulojn kreitajn de via terece obtuza pensado, por finfine ekkapti en vi tion, kio devas *eterne* resti konservita al vi, tuj kiam vi postulante prezentis vian proprietan rajton. – –

La „*fokuso*“ de via konscio ankoraŭ estas metita de vi *eksteren*.

Vi zorgu, mia amiko, ke vi remetu ĝin *tien*, kie ĝi estis *antaŭ eternecoj*, kaj kie ĝi tiam restos eterne *via propraĵo!* –

Kiam vi devas *forlasi* tiun ĉi surteran vivon, – kiom ajn firme vi kroĉiĝas al via *ŝajna posedaĵo*, – la „fokuso“ de via konscio alie troviĝus en *tio eterne malplena*, kaj nur post turmentoplene travivitaj eonoj vi finfine povus retrovi ĝin en vi mem. – – –

Estas *multe pli facile* ol kiom vi kredas, reveni *dum tiu ĉi surtera vivo* en vian plej internan *eston*, kaj senti vin mem *tie*, kie vi estas en via eterna *propraĵo*.

Tio ja ankoraŭ *ne* estas la estonta „*unuiĝo kun Dio*“, – sed vi ne povas sperti vin mem *unuiĝinta en Dio kun tio Dia*, antaŭ ol vi estos, en vi mem, fariĝinta konscia de via vera *esto*. –

Ĉi tien: – *en tiun ĉi plejinternon* devas iri returne via tuta *memkonscio*, se via ekzisto akiru per vi mem sian „*sencon*“!

Vi *atingos* tion, al kio vi strebas, se vi – malgraŭ ĉiu *ĝojo* pri la ekstera mondo – povas ĉiam teni maldorma en vi la senton, ke vivas en vi ankoraŭ *io alia*, kio superas ĉion, kio iam povus renkonti vin en la ekstera mondo, kaj ke „tio alia“ estas *vi mem*. –

Vi estas „io alia“ nur vidalvide al la *ekstera mondo*, kaj „io alia“ ol tio, kion vi – implikiĝinte en tiu ĉi ekstera mondo – kutime *rigardas kiel vin mem*.

Kiel vi nun ankoraŭ diras „mi“, kaj la enhavo de tiu ĉi mi-sentado estas kondiĉata nur de *io pereonta*, tiel vi, – kiam vi estos trovinta vian plejinternon en la „fokuso“ de via memkonscio, – diros samamaniere „mi“, kaj la *enhavo* de tiu ĉi, al vi tiom *nova „mi“* konsistos nur el *io nepereonta*, kion apenaŭ tuŝetas tio, kio sur la tero *restos pereonta*. – – –

Ne alimaniere homo vere *unuiĝinta kun Dio* diras „mi“, sed *en li* la enhavo de tiu ĉi „mi“ estas samtempe tralumita de la radiantaj lumoj de la *Dieco*, lumoj, en kiu tio nepereonta de la homo ekardas kiel gemo en la lumoj de la suno...

Ne lasu vin erarigi per raportoj de homoj, kiuj *en ekstazo* kredis esti unuiĝinta kun Dio, pro tio, ke ili ne povis, en la maniero de ili praktiki-ta, ekkoni sian propran plejinternon kaj tial sentis tiun plejinternon kiel estantan *ekster* ili.

Ili vidis en sia „ekstazo“ *sin mem kiel ion duan*, kaj tio ĉi, al ili fremda, estis por ilia sentado *tiom sublima*, ke ili ne povis doni al ĝi alian interpreton ol tiun, ke *la Dieco mem mal-supreniris en ilin*. — —

Tia iluziado estis trovebla en ĉiu tempo kaj en ĉiu popolo.

En pli granda nombro ol la aŭtunaj kolĉikoj sur malsekaj herbejoj, ankoraŭ nuntempe elkreskas en kelkaj kredorondoj tiaj homoj ŝajne „*grace favoritaj*“, kaj nur iu aŭ alia inter ili trovas sian kronikiston.

Servu al vi kiel gvidilo la certa scio, ke *ĉiu* spirita sperto vere bazita en la *eterna realo* ĉiam estas spertebla nur en pura „*mi*“-spertado.

Mi avertas vin kontraŭ ĉiu nevidebla „vi“, kiu volas fariĝi perceptebla al vi, eble kiel *spirita* „konsilanto“, aŭ eĉ kiel la „voĉo de Dio“.

En ĉiuj okazoj vi povas esti certa sen ia dubo, ke en tia maniero *neniam* atingas vin mesaĝo el la regno de la pura *spirito*.

Mi ne volas vidi vin *en timo* antaŭ ĉio *nevidebla*, sed mi tie ĉi havas la *devon* averti vin kontraŭ pereigaj influoj, kaj se vi deziras ricevi plian informon pri tiuj ĉi aferoj, vi ĝin trovos en pli detala formo en aliaj libroj miaj. –

Sufiĉu al vi mia diro, ke ĉio, kio venas de la *spirito de Dio*, eniras en vin nur tra via *plejinterno*, kaj fariĝas perceptebla nur per via vera „mi“ en via eterna esto. –

Vi tiam sentas: – „*Mi scias!* – sed *nun* mi scias vere en *alia* maniero ol kiam mi antaŭe kapablis scii el mi mem!“ –

Io „*parolas*“ en vi, – sed tiu „io“ ĉiam parolos al vi el via plej interna vera *esto*, kaj *via reala* „mi“ *peros* al vi, kion ĝi ricevas en la *spirito de la eterneco*...

Nur tiel povas esti donata al vi el la *spirito la ekkonkapablo*, kiun vi bezonas, kiam vi volas

lerni *distingi*, kun plena certeco, *ion spiritan* disde la formitaĵoj de via konstante formema *fantazio...*

Nenio alia okazas al homo *vere spirite vidanta*, kiam io vere spirita densiĝas antaŭ li ĝis *videbleco*.

Ĉiam li restas *aktiva* dum sia vidado.

La vidaĵoj *ne estas trudataj* al li, se ili vere originas el la *pura spirito...*

Eĉ se li ankoraŭ ne havas la potencon *decidi* en si mem, kion li volas vidi, tamen ĉiu *kapabla* vidi en la spirito scias, ke restas al li la *libereco enpreni* spiritajn bildojn, aŭ, – se li ilin ne bezonas, – tuj *malaperigi* ilin.

Bilda formitaĵo originanta *en la reale estanta, pura spirito* neniam povas kvazaŭ „*persekuti*“ homon, – neniam ĝi montriĝos, sen la volo de la vidanto, ankoraŭ tiam, kiam li direktas sian atenton al aliaj aferoj.

Kiu dum sia vidado sentas sin sub speco de *devigo*, tiu povas esti *tute certa*, ke tio, kion li vidas, *ne originas el la regno de la pura, reale*

estanta spirito, – eĉ se ŝajnas, ke ĝi povas veni nur el la plej altaj sferoj de lumo. – –

Tie ĉi, ankoraŭ hodiaŭ fatala eraro inundas la mondon, same kiel ĝi ankoraŭ hodiaŭ kovras preskaŭ ĉiun antikvan ateston de la vero per sia tenaca ŝlimo.

Iam oni denove eltrovos, ke la antikvuloj ja estis ne tute superstiĉaj, se ili parolis pri la ebl-eco „*esti obsedata*“, kaj iu aŭ alia instruo, kiu eĉ hodiaŭ fantomas en kelkaj kapoj, tiam certe estos senvualigata kiel rezulto de tia „obsedateco“. –

Se vi, ho serĉanto, volas atingi en vi vian *plej altan posedon*, vi ĉiam devas scii, ke vi povas atingi ĝin nur *en la libereco de via memdecido*.

Vi povas ĝin *serĉi* kaj fine en vi *trovi*, sed vi ankaŭ havas la liberecon *ne atenti ĝin*.

Sed se vi firme decidis *serĉi* ĝin en vi, tiam zorge tenu vin libera de ĉia katenado fare de la mallumaj potencoj, kiuj en la nevidebla regno ĉiam inside atendas oportunon, por sklavigi al si la animofortojn de homo.

Ili estas estaĵoj el la nevidebla regiono de tiu ĉi *fizika* mondo, kaj ĉio mirakla, kion ili povas fari, apartenas al la regiono de tiu nevidebla parto de la mondo.

Sed konvenas al ili *ĉiu rimedo* taŭga por subigi la animon – kaj ofte ankaŭ la fizikajn fortojn – de homo *al sia potenca volo...*

Restu for de tie, kie oni piakrede sin klinas antaŭ io nekomprenebla en tiu ĉi ekstera mondo nur pro tio, ke ĝi estas „nekomprenebla“, kaj kie oni do surbaze de ekstera sperto konkludas, ke tie ĉi la vera spirito de la eterneco manifestiĝas per stranga „*miraklo*“! – –

Nur *en vi mem* vi iam spertos – kondiĉe ke vi scias sufiĉe progresigi vin mem – la *veran* miraklon. –

Nur *en vi mem* – en via plejinterno – vi portas vian *plej altan* posedon, kiu ampleksas ĉion, kio servas al via *paco*. –

Vi mem havas la povon: aŭ nutri vian „*mion*“ per la perceptado kaj sentado de tiu ĉi *ekstera mondo* kaj persisti en tiu *ŝajna* „*mi*“, aŭ vere fariĝi, kaj por eterne resti, „*mi*“ *en tiu via plej alta posedo*. – –

Jam dum via *surtera vivo* vi povas trovi vian „*eternan vivon*“, kiun ĉiutempe promesis al vi ĉiuj veraj saĝuloj, ĉar ili mem estis *trovintaj* ĝin en si mem, – kaj vere: via ĝojo pri la tempa feliĉo de la *surtera vivo nur tiam estos sen pento*.–

LA „MALBONA“ HOMO

En antikva tempo estis iu, kiu sciis diri pri la homo nenion pli bonan, ol ke „la penso de lia koro estas malbona jam de lia juneco“.

Vi vere devus esti patro tre amarigita, se vi konsentus al tiu parolo...

Se vi mem ne estas „malbona“, vi certe trovos la „*bonon*“ ankaŭ en via infano, kaj vi ne devos enigi en ĝin per *edukado* tion, kio jam estas *denaska*. –

Vi eble eĉ malkovros, ke ankaŭ la laŭsupoza „*malbono*“ en la emocioj de la infana naturo certe ne originas el *malbona volo*, sed estas facile eksplikebla *alimaniere*.

Se vi tie ĉi volas juĝi juste, vi devos esti tre *prudenta*, kaj vi apenaŭ povos fidi al viaj *antaŭ-juĝoj*.

Sed estus *malsaĝe*, kontesti aŭ senpripense ignori la „malbonon“, kiu *povas* montriĝi en la homo *pli malfrue*.

Sed ĉu tiu „malbono“ estas io alia ol degenerinta instinkto de la *animala naturo* de l' homo?—

Tiun *instinkton de memkonservo*, kiu nur en *degenerinta* formo *fariĝas* urĝo al malbono, vi apenaŭ volos nomi *origine* „malbona“.

Ankaŭ en *aliaj* animaloj, kiujn vi penas apartigi tiom skrupule disde via *homanimala* naturo, vi kredas trovi la „malbonon“, ĝuste ĉar vi ja malkovras en ili vian propran animalan naturon kaj lasas vin forlogi al tio, ke vi projekcias viajn proprajn motivojn en la instinkton de la animalo.

Sed se vi ekzamenas la aferon pli ekzakte, vi facile konvinkiĝos, ke tie ĉi vi *malprave* parolas pri „malbono“, ĉar en la animalo tiu instinkto de memkonservo — eĉ kiam ĝi montriĝas *kruela* — tute ne estas *degenerinta*...

Vi vidos, ke en ĉiuj viaj kunanimaloj ĝi estas inter tre difinitaj *limoj*, konformaj al la aparta naturo de la koncerna animalo.

Nur la homo kelkfoje forrompas la limon, kiu same estas metita al li de lia animala naturo, kaj

nur en la homo la instinkto de memkonservo povas horore *degeneri*. – –

Vi tiam povas vidi tiun instinkton kreskegi senlime, nutrate de la fantazio de la homo, grasingate de lia imago. –

Kiam vi observas vian kunanimalon, dum ĝi *turmentas* sian predon antaŭ ol manĝi ĝin, vi tre rapide inklinas rigardi ĝian agadon kiel pruvon de ĝia denaska „malboneco“, kaj tamen tie ĉi temas nur pri eksterigo de: la *ĝojo pri la manĝo*, la *agrabla sento havi la predon en sia potenco*, kaj, lastvice sed ne lastrange, la *ĉeso de la akra streĉiteco* dum *embusko* por kapti la predon, aŭ dum arda *ĉaso*. –

Vi aŭdis pri sovaĝaj animaloj, kiuj estas *nedanĝeraj* post *satiĝo*, kaj pri aliaj, kiuj eĉ satiĝinte atakas ĉiun vivaĵon.

Tamen, ankaŭ animalon furiozantan nur pro pura „*mortigemo*“ vi certe ne devos nomi „malbona“, se vi ne volas erare projekcii la sentokapablon de via *homa* animo en ĝian animalan naturon.

Oni prave parolas pri la „animo“ de la animalo, kaj *tiu ĉi* speco de „animo“ ekzistas ankaŭ en

vi, sed ĝi havas nur fluidecan-*fizikan* naturon, kaj oni ne devas konfuzi ĝin kun la *eterna* animo, kiu originas el la oceano de animoelementoj kaj kiu spertas sin nur en la *homo*-animalo kaj *apud* ties „animala animo“. –

Nur per la fortoj de la *eterna* animo vi kapblas, sente kaj pense „*enmeti*“ vin mem en la probablan emocian situacion de alia vivaĵo. Nur per tiuj fortoj vi estas kapabla *kunsuferi* – kompati –, kiam vi vidas alian vivaĵon suferi.

Via kunanimalo eble *helpas* alian kunanimalon, kiam ĝi rimarkas, ke la alia bezonas helpon, sed ĝi *neniam* povos *kunsenti* la suferon de la alia animalo.

Ĝi scias nur: tie ĉi io de mia speco estas en danĝero, kaj penas – en la plej favora okazo – savi *sian specon* en la alia animalo.

Ankaŭ miriga fideleco estas trovebla en la „animo“ de animalo, kaj same teruro aŭ malĝojo, kiam ĝi vidas kunanimalon suferi (ankaŭ homo povas esti por ĝi „kunanimalo“), – sed *neniam*: egale vibranta *kunsento*, kiom ajn la homo inklinas atribui ĝin al certaj animaloj.

Hundo, al kiu tre mankas lia mastro kaj kiu sekve maltrankviliĝas aŭ eĉ rifuzas la manĝon, agas pro obtuza timo pro la estaĵo, kies volon li sentis kiel agrablan, sed ĝia agmaniero ne estas la rezulto de *kunsento* kaj ne bezonas iel diferencajn, se ĝia mastro vendis ĝin kaj havas la plej bonan sanon, aŭ mortis...

Tial la „sovaĝa“ animalo, kiu *turmentas* sian predon, tute ne sentas ĝojon pro la *turmento* de la alia animalo, ĉar *ĝojo* pro la turmento de aliu ĉiam kondiĉas la *kapablon kunsenti*, kvankam tie ĉi la kunsentado aperas en la konscio kiel *plezurego* anstataŭ kiel sufero. —

Ankaŭ la animalo, kiu mortigas — kiel la homo kutimas diri — *pro pura „mortigemo“*, avidas nur *sangon*, kiel deziratan specon de nutraĵo, aŭ volas ekstermi ion, kio povus iam fariĝi danĝera al ĝi, kaj ofte vekigatas en ĝi nur nerezistebla *ĉasemo*, kiam ĝi flarsentas la *predon* al ĝi agrablan. —

Eĉ la plej danĝeran rabobeston vi neniam povos kulpigi pri „*malbona*“ *faro*, pri *plezuro je „malbono“*, pri „*malboneco*“ en la *homa* *senco*.

Sed ankaŭ „malica“ *homo* kelkfoje sekvas nur sian *instinkton de memkonservo*, aŭ la *instinkton de konservo de la specio*...

Tio en li, kio ŝajnas al vi „malica“, povas ankoraŭ resti inter la *limoj*, kiujn la naturo metis al la instinktoj de konservo de si mem kaj de la specio...

Nur tie, kie la homo *forrompas* tiujn limojn, tia instinkto *degeneras* ĝis terureco.

Tiam ĝi fariĝas la urĝo detruiri alion *pro plezuro pri la sufero* rezultanta el tio por la aliaĵo...

Nur ĉi tie ni staras antaŭ la *reala „malbono“*.

Tie ĉi la „malbono“ estas *estigata* de la homo mem. — —

Ĝi fakte jam estas estigita, kiam ĝi ankoraŭ restas *kaŝita* al *ekstera rigardanto*, ĉar ĉiu „malbono“ estas generata kaj naskata en *pensado*.

Unue ĝi ekzistas kiel *penso*, antaŭ ol ĝi povas — plue generinte — naski *vorton* kaj *faron*. —

Vidu: la „malbono“ estas *kontraŭa* al la naturo kaj estas *altrudata* al ĝi fare de la homo. — —

Tuj kiam la instinkto de memkonservo *tropotenciĝas* kaj *degeneras*, tial ke la pensado de l' homo forrompas ĉiujn limojn, metitajn ankaŭ al li en lia *homanimala naturo*, ĝi *devas* fariĝi la urĝo al „malbono“, urĝo kiu fine estigas *plezuregon* je „malbono“, kaj *plezuregon* je *suferigo* de aliuloj. — —

Inter ĉiuj *videblaj* estaĵoj, sole *nur la homo* estigas la „malbonon“ en la videbla regiono.

Inter ĉiuj *fiziksense* percepteblaj estaĵoj, *li sola* estas *kapabla* por fari tion, ĉar nur li *povas*, per sia *pensado*, rompi la limojn, kiuj en la animala naturo *ĉirkaŭbaras* la instinkton de memkonservo. — —

Sed ne opiniu, ke la „malbono“ estas *restriktita* al tiu ĉi mondo de *videbleco*, kaj estas estiĝebla nur en la regiono de *homa* aktiveco.

Tia opinio povus fariĝi *fatala* por vi. — —

Tie ĉi vi devas etendi vian memgardon al *aferoj nevideblaj*, ĉar tio, kio en la ekstera mondo

estas por vi *sense perceptebla*, vere estas nur *la plej malgranda parto* de tiu ĉi mondo, kaj estus malsaĝe, se vi volus tute malatenti la *plej grandan...*

En la *nevidebla* parto de tiu ĉi ekstera mondo estas troveblaj diversaj estaĵoj, kiun vi *nomus* „malbonaj“ same kiel vi parolas pri „malbonaj“ *animaloj*, kaj tamen tie kaj tie ĉi energias la *instinktoj de konservo de si mem kaj de la specio*. –

Sed troviĝas en la nevidebla regiono ankaŭ *io alia*, kio estas komparebla kun *la furiozo de animalo en kaĝo*, – la furiozo de animalo, kiu volas regajni la liberecon, kiun ĝi vidas antaŭ siaj okuloj kaj kiu tamen restas al ĝi *neatingebla...*

Fine, ekzistas tie estaĵoj, kiuj, tute same kiel la videbla tera homo, povas *detru* la *limojn* de sia instinkto de memkonservo per sia *pensado*, ĉar en la kosmo la penso tute ne estas kondiĉita de fizikaj cerboj, kvankam ĝi fariĝas ekkaptebla por la surtera *homa animalo* nur per la cerbo. –

Same kiel la tera homo, tiuj estaĵoj generas kaj naskas „malbonon“ *en pensado*, sed ĉar tie ĉi la penso estas *libera* de la *rezisto*, kiun ĝia

transformado en cerban aktivecon trovas *ĉe la homo*, ĝi efikas *per senkompare pli granda forto*, kaj ne estas mezurable, kia torento da malfeliĉego tiel fluas konstante en la regionon de videbleco, kaŝite al la konscio de la tera homo kaj tamen ricevate de li, – pleje sen ia konscia defendado. – –

Estu feliĉa, ke tamen vi estas *ĉirkaŭmurigita* en tiu ĉi mondo de videbleco kaj povas, tuj kiam vi vere volas, *savi vin* de tiu fluego da „malbono“ *leviĝante en vian propran alton*. –

Gardu vin, ke vi ne mem faru la breĉon, tra kiu povus atingi vin la venena ŝlimo de malico de tiuj nevideblaj estaĵoj! – –

Sed pro simpla nescio ne malmultaj homoj *trarompas* la protektan muron *per siaj propraj pensoj*...

Ĉiu penso de „malico“, aŭ de malamo, – kiom ajn „inda“ je malamo vi opinias tion de vi malamatan, – metas vin, sen via scio, *sub la potencon de la demonoj el la nevidebla regiono*. –

Vi tiuokaze ilin *vokis, preparis* al ili *la vojon al vi*, – kaj vere: ili scias ennestigi en vi siajn pensofortojn. –

Nenombreblaj homoj tiel fariĝis „*obseda-toj*“, ne sciante pri tio, kaj ĉiu nova tago multe kreskigas la nombron de tiaj malfeliĉuloj. – –

Se vi iam falis sub tiu terura potenco, tiam povas liberigi vin de ĝi *nenio* alia ol via rezoluta, *absoluta* interna *deturniĝo* for de ĉiu, eĉ la *plej malgranda* penso de *malamo*, indiferente, kontraŭ kiu aŭ kio ĝi estas direktita, – via definitiva, per nenio ŝancebla *rifuzo* estonte toleri en vi ian eksenton de „*malico*“.

Ekzistas instruoj dirantaj al vi, ke ĉio malbona estas nur malplena „*ŝajno*“, tial ke ĉio en la kosmo ja „*devas*“ esti sendube *bona*, ĉar finfine *Dio* estas ĝia kreinto, kaj nur bono povas veni el Dio.

Tio estas nur *tre supraĵa* rigardmaniero, kvankam por kelkaj homoj ĝi povas fariĝi la kaŭzo de sufiĉe optimisma vivrigardo.

Kiu rapide kontentiĝis pri tiu sia laŭsupoza ekkono, estas komparebla kun grimpisto, kiu, ne konante la danĝeron, paŝas sur neĝa kornico, kiun ĉiu sperta alpisto evitus kaj grandkurbe ĉirkaŭirus...

Ankaŭ paŝante sur neĝkornico iu ja povas atingi la montopinton, – se li havas pli da fortuno ol da prudento, kaj la maldika ponto ne rompiĝas sub lia pezo...

Same, ankaŭ en la instruoj tie ĉi aluditaj estas kaŝita iometo da vero, kaj kiu povas ĝin trovi, al tiu ĝi servu kiel ponto trans la malluma abismo de la enigmoj de l' surtera vivo.

La *vero* en tiuj instruoj estas: ke ĉio malbona estas estigata nur en *ŝajna mondo*, – ĉu *videbla* aŭ *nevidebla*, – kaj ĉesas ekzisti por ĉiu, kiu transpaŝis tiujn ŝajnmondojn...

Sed se vi volas transpreni la supraĵan instruon kiel *tiam, kia ĝi estas donata*, en ĝia laŭvorta signifo, tiam vi konsekvence devas nomi ĉion surtere ĉirkaŭanta vin „*nura ŝajno*“, do ankaŭ la „*bonon*“; sed vi apenaŭ volos kontesti, ke tiu „*ŝajna mondo*“ povas ofte fariĝi forte *sentebla* al vi, ĉar ĝi tute ne estas *sen-esenca* ŝajno, – ĝi

neniom estas nesentebla „nenio“, – kaj ĝia ekzisto aŭ neekzisto certe ne dependas de via potenco. – –

Tial ne lasu vin trompi per la falsaj konkludoj de tia, tro hasta pseŭdoekkono, kiu estus vere malinda je vi.

Sed vi rigardu kiel *eraran* ankaŭ ĉiun instruon, kiu parolas al vi pri la „malbono“ kiel pri heredaĵo, kiun surtere vi neeviteble posedas *en via korpo*. –

Vere, – vi certe povas porti en via sango la *inklinon* al „malbono“ kiel heredaĵon de viaj prapatroj, sed la „malbono“ tute ne apartenas al *via naturo!*

Kiom ajn forte la eble heredita *emo* al „malbono“ allogas vin, – se vi ne ligas *vian volon* kun tiu emo, ĝi havos *neniun* potencon super vi.

Kiu fariĝas la predo de la pereigaj, logantaj avidoj *en sia sango*, tiu malsaĝe ludis kun si mem kaj estas malproksima de la scio pri sia propra forto.

La prauloj, kies sango cirkulas en vi kaj kiuj eble ne povis bridi ĝin en si mem, vere ne havas iun potencon super *via volo*.

Sed nun *sole nur via volo* decidis, ĉu vi lernas *regi* vian sangon, aŭ ĉu vi ĝin lasas sklavigi vin. — —

Certe, vi tie ĉi devos vere *voli*.

Via nura *deziro* vere povos fari *nenion*. —

Sed la plej multaj homoj trompas sin mem, kiam ili parolas pri sia „*volo*“, ĉar ili celas aŭ siajn *dezirojn*, aŭ eĉ la *avidojn de sia sango*, kiuj estu *venkataj* per la volo. — —

Iuj apenaŭ scias, *kiom* ili *mensogas* al si, dirante, ke ili estas „*tro malfortaj*“ por rezisti al la avidoj de sia sango, dum en ĉiu malluma horo ili povus surprizi sin mem ĉe la *ĝojo* pri ĝuste tiu avido, kiun li volis kontraŭbatali, kaj verdire *karese dorlotas* ĝin...

Sennombraj homoj faras frivolan *ludon* kun siaj *deziroj*, kvankam ili tre precize scias, ke ilia fina *plenumo* povas okazi nur en „*malbono*“ ...

Sed kiam, el avido kaj deziro, la „malbono“ estis *estigata* kaj fariĝis la *kaŭzo de malbona sekvo*, oni akuzas sian „sorton“, kaj fariĝas vir-

tuozo en la mizera arto, kiel transigi la propran kulpon al aliuloj. –

Ne malmultaj homoj povus forĝi al si alian sorton, se ili decidus *rifuzi dekomence ĉian* koncesion al la emo al „malbono“, tuj kiam ĝi fariĝas sentebla al ili eĉ nur milde. –

Kiam la „malbono“ generita en la imago volas naski la *faron*, tiam la forto de la homo jam estas *rompita*, – tiam la *volo* jam estas *aliancita* kun la „malbono“.

Rezistado tiam estas senŝanca kaj fariĝas *memturmentado*.

La unuan mildan eksenton direktitan al la „malbono“ vi devas sufoki, *antaŭ* ol ĝi fariĝas *forta sento* aŭ eĉ *penso*.

Se vi restas *gardema* en vi, tiam vi *facile* protektos vin kontraŭ danĝero.

Al vi mem vi devas fidi kaj al via propra *forto*, kiu estas *pli forta* ol ĉiu eventuala tento. – –

Ne vane tiu forto estas donita al vi, kaj nur *per konstanta uzado* vi povas *plifortigi* ĝin, se ĝi ankoraŭ ne sufiĉas al vi. –

Se vi kuraĝoplene fidas *vin mem*, vi vere povas esperi altan *spiritan helpon*.

Ĝi tiam doniĝos al vi en maniero, kiu kun certeco rezultigas, ke *vi mem* povas helpi al vi. –

MONTRIĜO DE LA MONDO DE LUMO

Certe, mia amiko, ne estas tute fremdaj al vi la momentoj, en kiuj – ŝajne sen iu kaŭzo – kaptis vin subite, kaj eble meze de multaj homoj, stranga sento de *senlima fremdeco* kontraŭ via medio, akompanate de la vekiĝo de neespri-mebla *sopiro*, kiu ofte daŭris plurajn horojn.

Se vi provas rememori tiun sopiron, vi hodiaŭ povas diri al mi:

„Ĝi estis la sopiro al antaŭsentita, neimag-eble fora hejmlando de mia animo.“

„Ĝi estis la sopiro al unuiĝo kun lumaj esta-ĵoj, kapablaj senti kaj kompreni mian plejinter-non.“

„Ĝi estis la sopiro kvazaŭ al nekonata alta feliĉo, kiu tamen ŝajnis al mi mirakle, intime konata.“

Eble estis en vi ankaŭ *miro* pri via sperto, ĉar vi ne sciis klarigi al vi, sur kio ĝi povas baziĝi...

Tie, kie vi tiumomente troviĝis en la ekstera mondo, nenia kaŭzo estis trovebla.

Sed vi ne kuraĝis iri *pluen*, ĉar vi ne volis fali en *superstiĉon*. —

Tial vi nomis vian sperton „*stranga animstato*“, kaj via menso fine laciĝis serĉi eksplikon.

Tamen vere ekzistis *motivo* por esplori la *kaŭzon* de tiu neordinara sperto, kaj se vi estus volinta serĉi plu, vi fine estus ekkoninta, ke via sento rezultis *el nekonscia intertuŝiĝo kun mondo nevidebla al vi*. — — —

Vi spertis nenion alian ol *veran montriĝon de la mondo de lumo*, meze de via surtera vivo, kaj ĉio surtere kutima subite ŝajnis al vi strange „*fremda*“, ĉar dum unu momento vi estis superlumigata el la lumoregno, kiu estas la vera hejmlando de via animo. — — —

Tiam devis kapti vin tiu *sopiro*, ĉar dum la intertuŝiĝo de la du mondoj vi nekonscie sentis, ke la ekstera mondo de la tero estas por vi nur bone konata „*fremda lando*“. — — —

Mi konsilas al vi: ekde nun *atentu* tiajn momentojn kaj danke akceptu, kion ili alportas al vi!

Tiaj momentoj kaŝe enhavas *misteran potencon*, kaj ili povas gajni grandan influon sur vian vivon.

Plej esenca ŝanĝo povas okazi en vi, se vi volonte pretas malfermi vin al iliaj mirakloj. –

Kaj atentante tion, vi baldaŭ ekkonos, ke tiaj momentoj revenas *post tute difinitaj tempoj*. –

Sed tiam vi rimarkos ankaŭ, ke tiuj tempoj fariĝas *pli kaj pli mallongaj*, ju pli *alte* vi taksas la valoron de tio, kion la intertuŝiĝo de la du mondoj havas por doni al vi. –

Multaj homoj penas ekvidi la mondon de lumo kaj ne trovas ĝin.

Sed ĉi tie *ĉiu homo* povas sperti ĝian montriĝon, kaj tiu sperto doniĝas al *ĉiu*, eĉ se li *neniam serĉas* ĝin.

Sed kelkaj homoj opinias, ke tio, kio tie ĉi estas spertebla, ja estas *tro malmulte signifa*, ĉar

laŭ *ilia* imago la mondo de lumo devas montriĝi en radiante hela klareco, se ili agnosku ĝin...

Ĝi do montriĝu al ili kvazaŭ *laŭ ilia preskribo*. –

Tiel la *ekzaltiteco de la imago* malhelpas, ke oni atentus la mildajn sentojn de l' koro, kiuj solaj povus alporti al homo ankoraŭ ne sperta pri la mondo de lumo ties montriĝon. –

Stranga fabelado ĉie abundas, kaj produktoj de konfuza fantaziado trompas la animojn, tiel ke ne estas mirige, ke tiom malmultaj *scias* pri la mondo de lumo, kvankam ĝi montriĝas al ili senĉese. – –

Oni ne *volas akcepti*, ke *tio eterna* montriĝas tiom *simpla*.

Oni deziras sperti „*ekster si*“, tremante pro skuiteco, la agadon de magiaj potencoj, kaj trovas nur mildan antaŭsenton de la mistera soleno de nekaptebla supermondo...

Sed se vi vere *volas fariĝi „scianta“*, vi devos atenti la delikatajn signojn, kiujn via plejinterno ricevas.

La mondo de lumo estas proksima al vi kiel la ekstera mondo, – sed ĝi neniam povos *montriĝi* al vi, se vi ne volas eduke kapabligi vian sentadon kapti la fluidon, kiu estas la substanco kaj vivospiro de la mondo de lumo. – –

Intertuŝiĝo de la du mondoj estas efektivigata sole per perceptado de *la oscilado de la reale estanta spirito-lumo-substanco* en via konscio, eĉ se vi *ne* scias interpreti tion, kion vi ekkonsciis...

Certe, ekzistas ankaŭ *alio*, kio volas montriĝi en vi kiel sperto *multe pli klara*, – sed vi ĉiam restos *antaŭ* la pordo de spertado, se vi ne scias aŭskulti la menciitajn mildajn sentojn en vi.

Ili povas doniĝi al vi en ĉiuj lokoj kaj en ĉiu animstato, se vi pretas atenti ilin.

En plej profunda *sufero*, kiel en plej radianta *feliĉo* vi povas sperti ilin, – meze de la *agada moviĝado de l' mondo*, kaj en plej kvieta *soleco*...

Ĉe la bordo de sovaĝe ondanta maro, kaj sur montoaltaĵoj, – en kamparo kaj arbaro, aŭ en ŝlosita ĉambro...

Verko de *arto* povas kaŭzi, ke vi tuŝas en vi mem la mondon de lumo, kaj la plej malgranda miraklo de la *natur*o povas rezultigi la samon...

Vi ne bezonas serĉi, por trovi la ĝustan lokon, kaj neniam preparado estas necesa.

Sed estas prudente, ke vi ĉiam tenu vin sur tiu interna alto, kiu pravigas vin esperi tion sanktan. –

Kun maldormaj sensoj kaj ĝojoj vi *uzu* la aferojn de la ekstera mondo kiel tion surtere donitan al vi, – sed gardu vin, ke vi ne *firme implikiĝu* en la ekstera mondo, tiel fariĝante „fatalo“ al vi mem! –

Kion ajn vi spertas en la ekstera mondo, – vi ĉiam devas resti *mastro* de via spertado. – –

Ne lasu vin kapti per la kaptiloj de falsaj emoj al libereco, kiel oni kaptas birdojn per nutraĵo antaŭ etenditaj retoj!

Ne ĉio, kion vi permesas al vi, *estas* al vi *permesita*. –

Vi ne povas atingi „kontakton“ kun la *mondo de lumo*, se vi, daŭre implikiĝante en aferoj *pereontaj*, serĉas nur la staton de agrablo. – –

Tio, kio estas pli pura ol ĉio pura de tiu ĉi tera mondo, ne povas miksiĝi kun la mucida polvo de la mallumo.

Krome, vi ne povas *percepti* la mondon de lumo, kiam ĝi tuŝas vian eksteran mondon, dum vi restas *blindigita* de trompa *flagranta lumo*, kaj taksas terajn valorojn pli alte ol kiom ili meritas, valorojn, kiuj senvaloriĝas, kiam rompiĝas la ligiloj katenantaj vin al la firmaĵo de tiu ĉi tero. —

Kiom ajn firme la tera kateno ĉirkaŭprenas vin, vi tamen, malgraŭ via ligiteco, restas *libera fari saĝan elekton*. —

El la *du ebloj*, kiuj estas malfermitaj al vi en ĉiu difinita tera implikiĝo, vi ekde nun devos lerni *elekti tiun*, kiu kondukas vin *pli alten*, kaj *eviti* tiun, kiu malhelpas al vi, ke vi *tenu* vin sur via alto. — —

Se vi estas iomete *gardema*, kiam tia elekto estas farenda, vi ĉiam scios, *kiun* el la du ebloj elekti.

Oni prave povas diri, ke „*kontraŭaĵoj* intertuŝiĝas“, kiam la mondo de lumo tuŝas en vi tiun ĉi teran mondon, kaj tamen nur *tio simila* estigas la *kontakton* tie ĉi...

Se vi volas *scii*, en la maldormeco de via konscio, pri la mondo de la vera lumo, kiam ĝi tuŝeble proksimiĝas al via ekstera vivo, tiam *tio via plej alta* devas *stremi renkonte al ĝi*. —

Nur tio, kio en vi mem estas *simila* al la lumomondo, povos *unuigi* sin kun ĝia lumo...

Ĝi *montriĝos ankaŭ tiam*, kiam ankoraŭ *nenio* en vi estas *lumigita* tiom, ke ĝi estus *akordigebla* kun la spirita lumo; sed *maldorme kaj sciante* vi estos ligita kun ĝi nur tiam, kiam ĝi povas tuŝi *ion similan* en vi. —

Do estas vere necese, kulturi ĉion altan en vi, kaj vi agos prudente, se vi ĉiam tenas vian konscion je *via plej alta* alto.

Vi devos *detiri* ĝin de ĉio, kio ne estas *akordigebla* kun *tio plej alta* en vi, kaj aferoj, kiuj bedaŭrinde jam antaŭ longe fariĝis al vi *kutimoj*, devos *foriĝi*, se vi volas iam maldorme unuigi vin kun la lumomondo. —

Sed tiam certe aperos al vi la tago, kiu trovos vin kapabla, ĝoje ekkapti ion preskaŭ nekapteblan.

Ĉiu tera mallumo tiam estos superlumigata el alta lumado.

Kio pli frue estis por vi nur fora *antaŭŝento*, tiam estos *spertado certa*.

La mondo de lumo, kiu antaŭe montriĝis al vi tiom ofte kaj ĉiufoje baldaŭ *malaperis*, tiam estas ĉiutempe *atingebla* al vi, – konstante malfermita al via maldorma konscio. – –

SIGNIFO DE LA SILENTADO

Kiuj strebas al la interna *lumo* kaj al tiu paco, kiun la ekstera mondo *ne* povas doni, tiuj devas lerni *silenti*, se ili volas proksimiĝi al sia alta celo. –

Ne malmultaj jam antaŭ longe estus atingintaj en si la lumon, se ili povus *silenti*.

Sed la plej multaj homoj supozeble kredas, ke ne devas okazi en ili io, kio ne tuj fariĝu la objekto de ilia parolado...

La plej milda volo *serĉi* ion en la propra interno, estas jam antaŭ la komenco de serĉado senfortigata per vanta anoncado, – sed kiam oni eĉ atingis *internan sperton*, *parolado* pri tio ne finiĝas, ĝis la tuta efiko de la sperto estas *forparolita*, kaj tamen la lango ne kvietiĝas.

En aŭtomata plua laboro la cerbo ĉiam trovas ion novan, kio ankoraŭ estas *dirinda*...

Mi tie ĉi parolas ne pri la maloftaj okazoj, en kiuj *aŭtentika spirita gvidado* postulas, ke la serĉanto komuniku al la instruanto tion, kion li spertis.

Tie ĉi la *devo paroli* povas esti plej efika faktoro de la *instruado*, dum ekzistas aliaj devoj, kiuj vere postulas la *kapablon silenti*.

Sed ankaŭ ĉi tie la serĉanto devos lerni *silenti* pri sia interna *spertado*.

Estas permesate al li malkaŝi ĝin *nur al tiu unu*, al kies spirita *gvidado* li sin konfidis, indifere, ĉu tiu unu agas el *propra* iluminiĝo aŭ *ricevis* de plialtulo la *aŭtoritaton* por tio...

Nur laŭ *eksplicita permeso* gvidato povos paroli *antaŭ siaj kungvidatoj* pri tio, kion li spertis en sia interno.

Tiel estis en ĉiuj tempoj, kaj la samo aplikiĝos post jarmiloj.

Tiu, kiun tiuj paroloj koncernas, certe komprenos min...

Ĉia *parolado* pri iu spirita strebado estas plej granda *disipado de energio*, tiom longe, ke an-

koraŭ ne estas *atingita* tio, kio estis la *celo* de la strebado. — —

Sed parolado povas fariĝi *multe pli fatala*, se la serĉanto parolas *antaŭ aliaj serĉantoj* pri aferoj, kiujn li jam spertis en si, sed kiuj povas fariĝi spertebaj al liaj samvojanoj eble en tre *diferenca* maniero, ĉar ĉiu spirita sperto restas *individue difinita kaj nemiksebla*. — —

Kiu emas paroli tiumaniere povas kaŭzi *nedireblan damaĝon al si mem kaj al aliuloj*.

Nenie oni praktikas en tiom senresponsa naiveco la plej malutilan paroladon, kiel en la rondoj de tiuj, kiuj spirite sopiras lumon. — — —

Ĉiu, kiu ankoraŭ tute ne povas helpi *sin mem*, tie ĉi kredas povi helpi *aliulon*, kaj kiom ajn multe iu homo *mem* bezonas helpon, li tamen opinias, ke nur la *aliulo* bezonas ĝin...

Tiu nelerta volo helpi baziĝas ne lastrange sur *nekonscia anima vanteco*, sed ĝia vasta agokampo estas prezentata al ĝi nur de la nehaltigebla parolemo de la aliuloj. —

Oni ne ofendiĝu, se mi komparas tiun parolemon kun „anima diareo“, ĉar tiom drasta bildo tie ĉi vere konvenas.

Plu neniu povas teni ion en si, tiel ke ne estas mirige, ke nur tiom malmultaj homoj per sia spirita spertado akiras ankaŭ spiritajn fortojn. –

La libristoj ne plu havas sufiĉan magazeno-spacon, ĉar hodiaŭ ĉiu gazetoleganto, kiu kredas esti pli aŭ malpli bone informita pri iu afero, sin sentas interne vokita skribi libron pri ĝi.

Same, la plej multaj el tiuj strebantaj al spirita lumo kredas, ke ili devas rakonti sian apenaŭ akiritan etan ekkonon al „spirite parencaj“ homoj, tuj kiam ili sentis en si la plej malgrandan spiritan sperton.

Tiu komunikemo estas estigata kaj konstante nutrata de la ideo, ke tie ĉi unu povas „*lerni ion*“ de la alia, kaj oni ne volas akcepti la fakton, ke temas pri „*spertado*“, kiun oni povas ne „*lerni*“, sed nur *travivi*. – – –

Sed *tio*, kio estas *lernenda* por atingi tiun travivadon, estis proklamata en ĉiuj tempoj de homoj *vokitaj* por instruado, kaj la instruo de ĉiu el ili postulis *silentadon*. –

Eĉ tie, kie oni ordonis silentadon rilate al aferoj, kies sekretigo aperas stranga kaj nenecesa, la vera motivo de la ordonoj plej ofte kuŝas en la scio pri la *progresiga valoro* de silentado...

Se la interna spertado de tera homo *transformu* lian animon, tiel ke fariĝas hela kaj klara tio, kio antaŭe estis malluma, tiam la animo devas esti plej zorge tenata en *trankvileco*.

Eĉ *la propra pensado* ne devas interne okupi sin tro laŭte pri tia spertado.

Nur homo spirite perfektiginta scias, kio povas sendanĝere esti *priparolata*, kaj se li gvidas serĉanton, li postulos de li parolan raporton *nur tiam*, se tio ne povas malutili la animan laboron, kiu estu progresigata per ĝi. –

Se vi, mia amiko, ne volas mem malhelpi vian altan strebadon, ankaŭ vi certe devos lerni silenti.

Mi ne povos alte taksi vian internan serĉadon, nek vian tutan fervoran agadon, se vi ne povas *silenti*.

Kaj ne nur *antaŭ aliuloj* vi devas kapabli silenti...

Vi devas lerni silenti eĉ *antaŭ vi mem*. — —

En tio, en kio vi tie ĉi sukcesu, vi certe ne sukcesos de unu tago al la sekvanta, kaj pli ol unu tento devos esti venkata en vi. —

Sed tie ĉi temas pri tio, ke vi atingu *vian plej altan celon*, kaj neniam *atingis* sian plej altan celon iu homo, kiu ne povis *silenti*. — — —

Sennombraj estas la babiladuloj, kiuj miras, ke ili atingas *nenion*, kvankam ili kredas esti ja farinta ĉion, kion oni povus postuli de ili.

Kaj eble ili vere faris multon ĝustan, sed tamen preterlasis ion gravan, ĉar ili ne lernis *silenti*. —

Sed vi ne faru la saman malĝustaĵon!

Estu por vi plej sankta *devo*, ekzerci vin en silentado!

Vi apenaŭ povos ĝuste taksi la valoron de silentado, antaŭ ol vi spertis en vi mem, kiel ĉiuj animoelementoj manifestiĝas en sia *plej alta efiko* nur dum *silentado*. — —

Sed vi lernu silenti ne nur pri *interna spertado*, sed ankaŭ *ĉie, kie ne estas necese paroli!*

Ne faru la malĝustaĵon de tiom multaj, ĉiam serĉi en vi ion, pri kio vi ankoraŭ povus paroli, sed prefere serĉu ĉion, kio povus *gajni forton per silentado*.

Kiom multe via silentado pligrandigas vian forton, tion vi jam baldaŭ povos sperti, kiam vi nur dum unu horo retenas parolon, kiu ĉiam denove volas sin premi tra viaj lipoj.

Aliflanke, via kapablo silenti ne devas delogi vin persisti en konstanta muteco, kiam oni povas prave atendi de vi, ke vi parolu!

Nur tiam silentado estos utila al vi, kiam neniu homo iam rimarkas, ke vi *devigas* vin silenti. — — —

Kiam vi havas interparolon kun homo, li neniam devas ekkoni, ke vi tamen *silentas* pri aferoj, pri kiuj povus esti parolo; nek devas fariĝi senteble al li, pri *kio* vi silentas, se via silentado ne perdu ĉiun sencon. —

Restu malproksima de vi ankaŭ la *malbonkonduta* silentado, al kiu senbride donas sin kelkaj homoj, kiam venas al ili, meze de la interparolo, pensoj kiuj bezonas tempon por esti mense ekkaptataj.

La tempo, dum kiu aliulo povas *atendi* de vi, ke li *ĉeestas* en via pensado, vere *ne* estas la tempo por okupiĝi pri ŝvebantaj ideoj. –

Neniam do devas *montriĝi ekstere*, ke vi *volas* ekzerci vin en silentado, – kaj nur *vi sola* estu *atestanto* de via silentado! – –

Sed vi ĉiam devos scii, *kie* vi havas *rajton* pri *silentado*, kaj *kie* aliuloj havas *rajton* pri via malkaŝa *parolo*. –

Se vi volus silenti, kie vi devus *paroli*, vi ŝarĝus vin per *kulpo*, kaj tiu kulpo pezus sur vi des pli, ju pli evidente estus por vi, ke via *devo* estus postulinta de vi *paroli*...

Same kiel pri via *parolado*, vi ĉiam devos *respondeci* ankaŭ pri via *silentado*, kaj neniu tera potenco povos iam *liberigi* vin de tiu ĉi *propra respondeco*. –

Kvankam la silentado, kiel kondiĉo de anima disvolviĝo, ne povas esti taksata sufiĉe alte, tamen oni ĉiam devas zorge atenti, ke ĉi tie ĉiu *valoro* ŝanĝiĝas en sian *malon*, tuj kiam la propra gajno estu akirata je la kosto de *aliuloj*. –

Tial via parolado kaj via silentado estu ĉiam gvidataj de la *amo* kaj gardataj de via maldorma volo!

Sed pli ol via *parolado* devos signifi por vi via *silentado*. –

Bone estas al vi, se vi scias ĝuste silenti. – –

VERO KAJ VEROJ

Se vi serĉas la eternan *veron*, kiu estas la „*esto*“ fora de ĉia ŝajno, vi devos lerni distingi inter tiu ĉi plej profunda, elfluiganta *pra-fundo* de ĉio „vera“, kaj la sennombraj *veroj*, kiuj eterne denove kaj en tre ŝanĝiĝema formo *elfluas* el ĝi. – –

Neŝanĝebla en si mem, la *vero* restas nur en la pura „*esto*“, – estante bazita en si mem, fontante el si mem, – sed *infinitoble* ĝi sin prezentas *en spaco kaj tempo*...

Neniam vi povus ekkoni *la absolutan veron*, kiu eĉ en la regno de la reale estanta spirito *restas eterne neekaptebla* kaj estas kaptebla nur *al si mem*. – – –

Al ĉio, kion la „*Patro*“ *generas* el la *vero en ĝia fonta fundo*, *vero* povas fariĝi ekkonebla nur en la *sama* maniero: – *kiel ekkonado de si mem*.

Do ekzistos por vi vere „nur *unu* vero“, – nur *unu* vero, kiun vi povas *ekkoni*: – *la vero de vi mem*. – –

Sed *sennombraj veroj ĉirkaŭfluas* vin de ĉiuj flankoj, kaj *ĉiu* el tiuj veroj aspiras sian *agnoskon*...

Via propria plej profunda vero ofte sin sentos premata pro tio, ke ĝi agnosku verojn, kiuj ŝajnas „*fremdaj*“ al ĝi kaj malfacile akordigeblaj kun ĝi mem.

Sed vi ne devos lasi vin ĝeni de tio.

Konsideru, ke *ĉiu* vero en spaco kaj tempo havas *sian propran formon* kaj ampleksas nur tion, kio konformas al *ĝia* formo.

Tiel ankaŭ vi estu konforma al *via propria* vero!

Tio rezultos, kiam vi scias ordoni al vi mem, tiel ke viaj pensado, parolado kaj agado ĉiam estas kaj restas elfunde *veraj*. –

Se vi konas vin mem kiel tute *veran*, vi ĉie povos ekkapti ankaŭ la antaŭe ŝajne „*fremdajn*“ verojn, en la maniero, en kiu sola ili *povas* fari-ĝi ekkapteblaj por vi: estante enteksitaj en *via propria* vero. – –

Vidu: – *ĉiu* tera homo portas *ĉiujn* infinitoblajn formojn de la vero vualitaj en si mem, sed nur *unu* el tiuj formoj povas *disvolviĝi* en li, povas doni al li *certecon* kaj *difinitecon*.

Li ne devas sin doni *jen al tiu, jen al tiu ĉi* vero, alie li *neniam* trovos *sian* formon de la vero...

Sed tiun formon li *trovos*, kiel mi jam diris, se li fariĝas tute *vera* en siaj tutaj *pensado, parolado kaj agado*, – en ĉiu eksterigo de sia vivo.

Kio tiam montriĝas al li *vera* en la lumo de *lia* vero, tio vere *estos* vero, ĉar trompo kaj mensogo ne havas potencon en homo, kies propra vero fariĝis la gvida stelo de lia vivo. – –

Sed vi vidas, ke multaj homoj kredas „*esti en la vero*“ kaj tamen evidente estas sklavoj de iu fatala *eraro* aŭ de neekkonita *mensogo*...

Ne konfuziĝu per ilia blindiĝo, kaj ne lasu vin kapti en la kaptiloj de iliaj trompaj konkludoj!

Kaj ne opiniu „*malbona*“ ĉiun, kiu fariĝis predo de tiuj falsaj konkludoj!

Estu justa, kaj trankvile ekkonu, ke la plej multaj el la sklavoj de iu iluzio estas *sincere konvinkitaj*, ke ili *reale estas* en la vero!

Sed ĉiuj el ili tuj estus liberaj de siaj katenoj, se ili *mem* volus fariĝi *veraj*, anstataŭ lasi sin ĉirkaŭŝpini de pensoŝpinaĵoj, en kiuj ili kredas ekkoni la precertan memateston de la vero. — —

Vi vidos *aliajn* homojn stari tro multe *sub la kvazaŭ sorĉa influo* de certaj veroj, tiel ke ili povas toleri apud tiuj *neniun alian* veron...

Se vi renkontas tian homon, ne estu same ne-tolerema, kaj ne provu tiri lin perforte el tiu influo!

Ekzistas multaj vojoj, sur kiuj homo tamen povas fine veni al sia *propra* vero, eĉ *fariĝi* la vero, kaj iu aŭ alia animo unue devas resti longe *sub la influo* de *plej diversaj* veroj, antaŭ ol ĝi venas *al si mem*, por fariĝi *vera* antaŭ si mem. —

Esti *vera* antaŭ si mem ne estas tute facile, kaj se vi volas provi tion, vi baldaŭ rimarkos, ke vi jam ofte volis *aperi* al vi *vera*, dum multo en vi ankoraŭ statis subigita al trompemo kaj nura ŝajno...

Sed esti *vera* ankaŭ *ne* signifas: nur registri perceptojn kaj sentojn, *kiel maŝino povus registri ilin*.

Eĉ se vi konstante faras raporton al vi pri perceptoj kaj sentoj kun maŝina ekzakteco kaj plej skrupula precizeco, vi tamen povas esti profunde – *malvera*. –

Vi eĉ *bezonas* certan „*spacon por libere moviĝi*“ inter la *ekzakta analizo* de viaj perceptoj kaj sentoj kaj *ilia interpretado* por vi mem, alie ĝuste *via fanatikeco pri vero* logos vin en la kampon de *memtrompo*, kiu estas plena de vaglumoj super mallumaj marĉoj. – – –

Kvankam vi klopodas, kun arda veramo, teni vin libera de trompiĝoj pri vi mem, vi tamen ankoraŭ atingas malmulton, tiom longe, ke via klopodado direktiĝas *nur* al tio, ke vi venu al

senindulga klareco en la *determinado* de ĉio, kio movas vian koron...

Viaj unuopaj juĝoj povas esti *ĝustaj* en ĉiu ekzamenita okazo, kaj tamen *via tuta vivo* povas prezenti tute *alian* bildon ol tiu, kiu rezultus el la nura sumigo de viaj unuopaj juĝoj pri perceptoj kaj sentoj en vi. — —

Estas ankaŭ eraro kredi, ke oni jam estas *vera*, se oni tenas nur sian *parolon* libera de mensogo kaj de la intenco trompi.

Esti *vera* signifas antaŭ ĉio: bridi siajn *pensojn* per streĉita brido, por ke ili ne forlasu, forlogite de *deziro*, *timo* aŭ *revado*, la vojon de sobra ekkonado kaj svarmu en necertajn vastaĵojn, kie ili plej ofte estas sufiĉe malfacile rekapteblaj...

Se vi estas vera en viaj *pensoj*, tiam ankaŭ via *parolo* kaj via *ago* atestos pri via vero, eĉ se via parolo *eraras* aŭ se via ago kelkfoje *malpravigas* vin. — —

Certe estas pli bone, ke oni povas pruvi vin kulpa pri *eraro* aŭ *maljustaĵo*, kiun vi *ne intencis*, ol pri *malvero kontraŭ vi mem*, — eĉ se vi faris ĝin por *eviti* eraron aŭ maljustaĵon. — —

Sed tuj kiam vi fariĝis reale *vera* en vi mem, novaj *veroj* renkontos vin ĉiutage, kaj ili *ne plu* ŝajnos al vi „fremdaj“. –

Vi ekkonos, ke vi portas ankaŭ la veron de ĉiu *alia* homo *en vi mem*, kvankam ĝi estas en vi nur *apuda vero*, kiu, male al *via propria centra vero*, ne difinas viajn vojon kaj celon.

Tiel vi fariĝos *tolerema* kontraŭ aliaj, kaj vi ne taksos aliulon pli malalte pro tio, ke li ne sekvas *vian* veron, se vi vidas lin sekvi *sian* veron en *sia* maniero. – –

Vi ekkonos, ke la absoluta vero, kiu estas „*kaptebla*“ *sole* al si mem, malkaŝas sin al la perceptokapablo de la homo en *nenombreblaj* formoj, kaj ke eĉ la *plej fora* el tiuj formoj entenas *lumon* de *ĝia* lumo. –

Vi povas esti feliĉa, se vi scias, ke *via propria* vero troviĝas en la *plej proksimaj* gradoj de tralumigo fare de la *absoluta* vero, sed vi certe ne plu malestimos la verojn de *pli foraj* gradoj de tralumigo, kaj vi vidos en ĉiuj *nenombreblaj* gradoj *la unu eternan veron*. – – –

FINA ĈAPITRO

La moko, kiu ofte malstreĉas alie fatale streĉitan situacion, prave elektis al si kiel celobjekton la „*piulojn*“, kiuj faris el la pieco paradadon kun „*himnaro*“ kaj devotaĵoj, ruladon de la okuloj al la ĉielo, kaj afektadon de aroganta memkontenteco kaj solena patoso.

Sed oni ne forgesu, ke nuntempe estas malfacile al ne malmultaj homoj, entute kredi je la *valoro* de la *vera pieco*. –

Eĉ se ili povus esti *piaj* en la *plej bona* senco de la vorto, ili tamen sentas sin tro forte kontrafitaj de tiu prava moko, – kvankam ĝi celas nur *bigotecon* kaj *fariseecon*, – ol ke ili kuraĝus malkaŝe konfesi, kiom banala kaj malplena aperus al ili vivo sen *vera pieco*.

Oni eble riproĉas *malsaĝon* al timemaj animoj, kiuj tiumaniere malfidas sian plej bonan sentadon; sed ilia timideco signifas ankaŭ, ke ili konscias la altan valoron de *vera pieco*, ĉar ver-

dire ili timas nur la *profanadon* de interna sper-
to, kiu estas *sankta* al ili...

Tamen oni tie ĉi povus intermeti, ke temas
nur pri *subjektivaj* valoroj, tiel ke la vera pieco
eble estas bezono, aŭ sufiĉas, *nur al malmultaj*,
laŭ ilia naturo.

Sed ĉar mi promesis al vi ĝuste gvidi vin kaj
konduki vin sur sekuran vojon, vin, kiu serĉas
la „*sencon de la vivo*“, mi devas nun, je la fino
de la kondukado, ankaŭ montri al vi, ke vi neni-
am povos ekkoni kaj kompreni la *sencon de la*
vivo, se ne plenigas vin *vera*, pura *pieco*. — —

Mi jam komence diris al vi, ke vi devas lerni
demandi en nova maniero: — ke vi demandu *ne*
pri la „*senco de la vivo*“, sed pri tio, *kiel* vi po-
vus *doni* „*sencon*“ al *via vivo*...

Sed se vi nun demandas laŭ la maniero, kiun
mi instruis al vi, mi fine povas diri al vi nenion
pli bonan ol la sekvantan konsilon:

Plenigu vian koron per vera, pura pieco!

Nur tiel vi donos al via vivo *eterne* validan „*sencon*“. — — —

Sed mi esperas, ke vi faris vian demandon pri la „*senco de la vivo*“ ne pro la banala, supraĵa scivolemo, kiu demandas nur, kiel terece malvasta intelekto – eĉ se temas pri la intelekto de la plej saĝa el la saĝuloj – povas pli aŭ malpli bone fari tiun ĉi vivon „klarigebla“ al si.—

Vere *ne* estas la tasko de mia instruo, prezenti nutron al tia *scivolemo*, kaj *malproksimaj* de mi estas la egoismaj, timemaj „*filoj de ĉi tiu mondo*“, kiuj ĉiam volas ekscii nur, *kio* ilin *atendas*, anstataŭ ĉiam *agi* tiumaniere, ke nur *tio plej bona* povas doniĝi al ili...

Kiu tie ĉi sentas sin „*trafita*“, tiun trafu *kva-zaŭ vipobato*, por ke li finfine *vekiĝu* el sia sonĝo kaj fariĝu *matura* por tio sia plej bona, – fariĝu *rajtigita* akiri sian heredaĵon! –

Se mi diras, ke vi kapablas doni „*sencon*“ al via vivo, mi deziras nur montri al vi, ke tiu ĉi

vivo, – kvankam per si mem estante la neŝanĝebla „*sekvo*“ de tiom multaj „*kaŭzoj*“, – ree fariĝas la kaŭzo de nova „*sekvo*“, kaj ke vi havas la potencon, nun *propradecide* aliformigi tiun ĉi vivon, laŭ la etendiĝo de via potenco. – –

Ne temas nur pri la estigado de *sublimaj sentoj* en vi, aŭ eĉ pri la veko en vi de la infanaĵa, vanta kredo, ke vi havas „*mision*“, kaj ke vi estas treege grava por la Dieco en ĉiu via farado. –

Vi eble estas surtere la plej potenca kaj plej alta homo, la heredanto de antikva familio, dinastio kaj nemezurebla posedaĵo, kaj tamen vi, kiel tera homo, restas antaŭ la juĝo de la eterneco *povra, malsaĝa vermo*, kiun piedbato povas dispremi, kvankam la koro movanta tiun piedon deziras indulgi vin.

La *aliformigo* de via vivo, kiu aliformigas la *sekvon* de via vivo, postulas de vi *pli* ol nur ŝanĝon de viaj sentoj, – ol nur transponadon de via ĝisnuna *tera impondeziro* en la regionon de *eterna* spertado. –

Indiferente, ĉu vi estas la plejpotenculo inter regantoj aŭ la plejmalriĉulo inter almozantoj, vi

ambaŭokaze devas scii, ke ĉio ĉi estas vere *malgrava*, ĉiurilate *sen-esenca* antaŭ la okuloj de tiuj, kiuj estas *la sacerdotoj kaj reĝoj de la reala, eterna spirito*, kvankam ili tie ĉi surtere vin agnoskas laŭ la surtere de vi ĝuata *respekto* aŭ *aŭtoritato*, kiom vi mem ebligas tion al ili. — — —

Tio, kion la *spirita leĝo* postulas de vi, estas maldorma, bone pripensita ago.

Oni certe ne postulas de vi „*tromulton*“.

Sed vi devas *pruvi*, ke vi estas *serioza* en via strebado, kaj tiun pruvon vi povas alporti nur, se vi uzas la potencon, kiu estas donita al vi super *teraj aferoj*, por havigi al vi trezorojn en la *eterneco*, kiujn „nek rusto nek tineo konsumas“.

Tie ĉi *ne ekzistas* „*nuligo*“ aŭ „*transformado*“ de tio postulita, kiom ajn volonte la eterna amo dezirus koncedi al vi nuligon aŭ transformadon laŭ *via* bontrovo. —

Vi ankaŭ devos gardi vin, ke vi ne kredu, ke vi eble povas iomete *trompi la spiriton de la eterneco*, nur *ŝajnigante*, ke vi *faras* tion postula-

tan de vi, kaj tamen *ne farante* tion, kio kontraŭas al via terece malvasta memamo. — —

Vi ne estas „*juĝata*“, sed *juĝas* vin mem per la uzado de tio, kio surtere estas sub via potenco.

Se vi estas malriĉa *almozulo*, vi povas esti certa, ke tio, kion vi agos *surbaze de via malriĉeco*, havos *ne malpli da* valoro ol la grandaj faroj de riĉulo, — sed se vi vivas en *riĉeco*, via surtera agado spirite validas *nur tiom*, kiom ĝi estas *konforma* al tiu riĉeco...

Vi tiam ankaŭ devos alporti, el tio transdonita al vi, vian justan kontribuaĵon por pligrandigi *la kapitalon de la spirito* tie ĉi en la videbla mondo. —

Vi mem devas scii kaj senti, kion la *spirito de la eterneco*, el kiu vi originas, *postulas de vi* en la formo de *materiala* kontribuaĵo en tiu ĉi mondo de *materialaj* valoroj, — kaj vi certe ne progresos en spirita rilato, se vi ne volas prezenti *ankaŭ* en la formo de *surtere validaj* valoroj tion, kion vi povas doni...

Tute ne temas pri tio, ke vi disdonu vian havaĵon, — sed el la kvanto de tio, kion vi posedas,

sekvas, kiom vi *povas* doni por ankri tion spiritan en tiu ĉi tera mondo, kaj per la sama kvanto difiniĝas ankaŭ la mezuro de la bonfarado, kiu estas devo surmetita sur vin. — —

El la *spirito* oni postulas *nur*, ke via spirita strebado ĉiam ampleksu *ankaŭ vian eksteran vivon*, kaj ke ĝi sekve metu ĉiom de la ekstera potenco, kiu estas donita al vi, *en la servon de la eterneco...*

Neniam oni postulas de vi *pli* ol kiom vi vere *povas* fari, sen neglekti devojn, kiuj rezultas el via ekstera vivo. —

Sed *certe* venos tago, en kiu vi amare pentus, ke vi *ne* plenumis la postulon de la spirito.

Ĉar vi neniam povas fuĝi el via *eterna vivo*, vere estas *sage*, aranĝi ankaŭ tiun ĉi surteran vivon laŭ la leĝoj de l' eterna vivo.

Ankaŭ la *surtera vivo* baziĝas en via *eterna vivo*, al kiu estas malgrave, se vi kredas, ke vi povas *nei* ĝian ekzistadon.

Vi apenaŭ povos doni „*sencon*“ al tiu ĉi vivo alimaniere ol per tio, ke vi penas sperti ĝin mal-

dorme kaj konscie kiel parton de via *eterna* vivo. — —

Sed en tio vi sukcesos nur, se vi forlasas la eraron, kiu volas ŝajnigi al vi, ke vi povas iam konscie esti en via *eterna* vivo, *sen* antaŭe *esti forminta vian spertadon de tiu ĉi surtera vivo laŭspirite*. —

Se vi volas doni „*sencon*“ al via vivo, tiam ordigu *ĉion*, kion vi faras tie ĉi, ĉiam *tiumaniere*, ke ankaŭ *eternaj* valoroj estas progresigataj per via farado. — —

Via vivo havas „*sencon*“ nur, se ĝi efikas *plue generante* kaj ĝiaj fruktoj *konserviĝas* al vi *por eterne*. — —

Fino

Tradukoj de pliaj libroj
el la spirita verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:
<http://www.a-rehfeldt.de>